

どのくらいのレベルに達することができるか、日常的に用いる機会があるかといったことは別にすれば、現在の北海道でアイヌ語を学ぶ機会を得ることは、そう難しくない。週一度のラジオ講座があり（再放送もある）、各地にアイヌ語教室があり、手軽な入門書も刊行されている。アイヌ語をめぐるこうした現状には長い前史があるが、直接的な背景には、1980年代以降に活発化した権利回復を求めるアイヌ民族の様々な動きを挙げることができる。

明治期以降の北海道の近代史を見渡してみると、これは大きな変化である。

1869年、明治政府は開拓使を設置し、北海道を明確に日本の領土とした。開拓使はアイヌ民族を戸籍に編入し日本国民の枠内に入れたが、「旧土人」という枠組みを用意し、場合によっては他の日本人とは区別した扱いをすることもあった。

近代日本の法令のなかで、アイヌ語の禁止を直接に定めたものは見当たらない。けれども、開拓使やそれ以降の官庁は、アイヌ独自の生活習慣や信仰を日本風のものに改めることを政策の基調とし、アイヌが日本語を身につけることを強く奨励した。

近代日本のアイヌ政策の中心に位置する「北海道旧土人保護法」（1899年制定）は、農耕に使用目的を限定した土地をアイヌに「与える」とし、国費によって学校を設けて児童を教育することを柱としていた。アイヌの別学を原則とした「アイヌ学校」では、日本風の価値観や日本語を教え、アイヌ語を教えることはなかった。

日本政府が支配し、本州以南からの移住者が圧倒的な多数者となっていった北海道では、日本語の読み書きに通じていなければ、生活のうえで非常に不利な立場に置かれた。アイヌを「滅びゆく民族」とする見方が、社会に深く浸透してもいた。こうした事情を背景として、アイヌの若者がアイヌ語を含めアイヌ風のを嫌ったり、大人たちが次世代に引き継ぐことに消極的になる傾向が広く見られた。

1920、30年代には、明治期以降の学校教育のなかで学んだ世代のアイヌが、日本語をいわば武器として、著書や雑誌を刊行したり、新聞に寄稿したりする動きが活発化した。その主な内容は、アイヌ自身の自覚の呼びかけ、アイヌ蔑視への批判、平等で充実した教育の実現などであり、アイヌ語の保護や継承を直接に呼びかけたものは見当たらない。

アイヌの神謡をアイヌ語と日本語訳で紹介した知里幸恵の『アイヌ神謡集』（1923年）や、アイヌ語を交えた作品も多く含むバチエラ八重子の歌集『若きウタリへ』（1931年）には、アイヌ語へのとても強い愛着が感じられるとともに、それを率直に訴えることは難しく、屈折を帯びてしまうこの時代の雰囲気を出している。

なお、近代北海道において官庁がアイヌ語の排除の方針を明確に規定した文書として、北海道庁が1920年代以降に進めた各町村の字名整理・改正事業の過程で発したものがあつた。今も多く残るアイヌ語地名のかげに、そうした歴史があることも紹介したい。

Estas ne tre malfacile kapti ŝancon lerni la ainan lingvon en Hokkajdo, se oni flankenmetas la problemojn, ĉu la lingva nivelo sufiĉas, ĉu oni havas ŝancon paroli aine ĉiutage. Du fojojn semajne oni disaŭdigas per radio samenhavan radiokurson. Okazas ainlingvaj kursoj en multaj lokoj. Ankaŭ facilaj lernolibroj estas eldonitaj. Estis longa historio pri ainlingva lernado ĝis nuna prosperiĝo. Tiu prosperiĝo estas rekte kaŭzita de la diversaj movadoj por reakiri rajtojn de Aina gento, aktivigintaj post la 80-aj jaroj de la lasta jarcento.

Tio estas granda ŝanĝo en moderna historio de Hokkajdo post 1867 (Meiji-Renovigo).

En 1869 la nova registaro fondis Kolonian Fakon por klare montri, ke Hokkajdo apartenas al Japanio. Kolonia Fakoj registris ainojn kiel japanaj civitanoj, sed en kadro nomata "eks-indiĝeno" por eventuala distingo disde aliaj "denaskaj" japanoj.

En moderna Japanio ne troviĝas ia leĝo rekte malpermesanta la uzadon de la aina lingvo. Sed Kolonia Fakoj kaj postaj japanaj registaraj oficejoj celis japanigi la morojn kaj religion de ainoj kaj forte rekomendis al ainoj mastri la japanan lingvon.

La Leĝo protekti Eks-indiĝenojn, establita en 1899, estis la kerno de la japana politiko por aina gento. Ĝi celis unue por "doni" teron al ainoj por limigita celo kultivi, due konstrui lernejojn per ŝtata kaso por eduki ainajn infanojn. Tiam "Aina Lernejo" estis nur por ainaj infanoj aparte de la japanaj. Tie oni instruis japanan valorkoncepton kaj la japanan lingvon, sed ne la ainan lingvon.

En Hokkajdo, regata de Japana registaro kaj jam plejmulte loĝata de japanaj enmigrintoj, ainoj suferis grandan malprofiton en ĉiutaga vivo, se ili ne scipovis la japanan lingvon. Vastiĝis kaj profundiĝis la kompreno, ke ainoj estas "pereanta gento". Pro tia fono vastiĝis inklino, ke ainaj junuloj ne ŝatas ainan lingvon kaj kulturon, aĝuloj ne emas heredigi sian kulturon al junuloj.

En 20-aj kaj 30-aj jaroj de la pasinta jarcento aktivigis de la aina flanko eldonoj de libro kaj gazeto, kontribuoj al tagĵurnaloj.

Tion faris ainoj edukitaj en lernejoj post la Meiji-Renovigo. Ili uzis la japanan lingvon kiel la armilon por alvoki al samgenteroj por genta konscio, kritiki kontraŭ malestimo al ainoj, por realigo de edukado egala kaj kompleta, k.a. Ne troviĝis alvoko por protekto kaj heredo de la aina lingvo. En 1923 ĈIRI Jukie eldonis libreton "Ainaj Jukaroj" (アイヌ神謡集). Ĝi prezentis diajn eposojn per aina originalo kaj japan-lingva traduko. En 1931 BAĈELA Jaeko (BATCHELOR Yaeko) eldonis utaaron "Al junaj fratoj" (若きウタリに), kiu prezentas utaojn per japana lingvo sed parte ankaŭ per ainaj vortoj. Ambaŭ verkintinoj montris fortan amon al la aina lingvo. Sed por ili estis malfacile apeli la amon senkaŝe kaj ofte montriĝas fleksiĝo pro tiama atmosfero.

Troviĝas unu dokumento de ŝtata oficejo pri forigo de la aina lingvo. Ĝi estas regulo eldonita de la Gubernio Hokkajdo, pri revizio de lokonomoj plenumita post la 20-aj jaroj de la pasinta jarcento. Kvankam ankoraŭ nun restas multaj aindevenaj lokonomoj, oni sciu ankaŭ pri tia historio.